

VI RESTIS SOLA

Esperantigo : Rovere Emanuele

Muziko : Gianco Riki / vortoj : Del Prete Miki

Nun vi restis tute sola, ploras kaj ĉion rememoras ;

glitas larmoj sur via vizaĝo, malrapide, dolorige.

Nun vi restis tute sola, min serĉas inter homamasoj.

Eble, sur viaj manoj senfortaj, vi priploras vian pasintecon.

Venos baldaŭ la tempo, kiam vi pripentos min

kaj vi komprenos, ke posedis vi la tutan mondon.

Via vivo sencela utilos plu al nenio,

dum pli kaj pli malbela, senĝoja ŝajnos ĉio .

Nun vi restis tute sola, ploras kaj ĉion rememoras ;

glitas larmoj sur via vizaĝo, malrapide, dolorige.